# nia voĉo

## madrida esperanto-liceo marto 2025

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

Kiel anoncite en pasinta numero, Madrida Esperanto-Liceo (MEL) okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 24an de februaro.

La ĉeestintoj diskutis kaj aprobis raportojn pri: la evoluo de la membraro, la financa raporto 2024, la agad-raporto de la pasinta jaro. Oni aprobis la buĝeton por 2025, la jarkotizojn 2026 (kiuj restas senŝanĝaj, je 12 eŭroj) kaj la agad-programon por 2025.

Rilate al la partopreno de Liceo en la reto, oni diskutis la alternativojn por konsidero pro la evoluo de la socia reto X (Twitter) en kiu la Liceo havas konton. Oni decidas ĉesigi iom post iom la aktivadon en tiu reto, kaj periode publikigi rememorigojn pri nia nova ĉeesto en la reto BlueSky, kie ni publikigos novaĵojn kaj informojn. En venonta kunveno oni decidos, laŭ la evoluo, ĉu entute ĉesigi laj forviŝi nian ĉeeston en X.

Oni memorigis ke HEF eldonis novan version de la paneloj por ekspozicio, tre plibonigitaj, do oni invitas la anojn kaj aktivulojn serĉi publikajn lokojn por ilin ekspozicii.

Memoru ke por aliĝi al MEL sufiĉas ke vi plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es. La kotizo estas nur 12€ jare.

## PARTOPRENO DE MADRIDANOJ EN FEBRUARAJ AKTIVAĴOJ

Kiel ni anoncis en pasinta numero, multaj aktivaĵoj okazis en februaro en la najbara provinco Segovio, organizitaj de la Segovia Esperanto-Asocio, kun iom da kunlaboro de madridaj samideanoj, kaj kelkaj el ili plu daŭros en marto. La ekspozicio pri Esperanto "Esperanto: de utopía a realidad", en la Publika Biblioteko de la provinca ĉefurbo daŭros ĝis la 31a de marto (vidu aspekton en la apuda foto). Ankaŭ disvolviĝas kurso, kiu komenciĝis la 12an de februaro, kun sufiĉe bona partopreno.



Ambaŭ aktivadoj, plus la okazinta prelega prezentado en la Biblioteko (kiun gvidis Toño del Barrio kaj Miguel Fernández) tre alte eĥis en la segoviaj komunikiloj.

Ankaŭ estis tre sukcesa la ĉi-jara RenKEJtiĝo, la kunveno de la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) kiu daŭris 4 tagojn (ekde ĵaudo 20a ĝis dimanĉo 23a de februaro) en Olot, kun pli ol 50 partoprenantoj el pli ol 10 landoj.



Partoprenis almenaŭ 4 madridanoj, kelkaj tre aktive. Jaime, ĝis antaŭ nelonge loĝinta en Madrido, unu el la ĉeforganizantoj, Albert kiu faris prelegon pri IJK 2025, Irene kiu helpis la organizan teamon plurmaniere kaj estis la ĉefa rolulino dum la karnavala programero, Adam kiu kunlaboris en la "prediko" de la karnavala programero.

## NOVAĴOJ DE LA HISPANA KONGRESO EN SORIO

Memoru ke fine de marto fermiĝos la rabatita aliĝperiodo por la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso 2025, kiu okazos en Sorio komence de majo. Jam pli ol 125 homoj aliĝis.

Oni malfermis Telegramkanalon: https://t.me/HispanaEsperantoKongreso, kiu taŭgos por ricevi ĝisdatiĝojn de la organizado, kaj por ke kongresanoj povas interkomunikiĝi (ekzemple, kiel oni jam faris, por la komuna transporto al Sorio). La LKK informas ankaŭ ke necesas mendi la komunan bankedon antaŭ la 15-a de marto, kaj ke ankaŭ la ekskursojn oni mendu kiom eble plej frue por faciligi la organizadon.

Ni memorigas ke pliajn informojn oni povas trovi en la adreso: https://kongreso.esperanto.es/, kun la aliĝilo kaj la listo de aliĝintoj.

## MEMORU ALIĜI AL LA LIBERAJ EKZAMENOJ DE ESPERANTO EN UNED

Ni plu memorigas ke ĝis la 31-a de marto eblos aliĝi al la "liberaj" ekzamenoj de niveloj A2 kaj B1 en UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia). Ili ebligas ricevi la saman atestilon kiun studentoj akiras trapasinte la respondajn lingvokursojn de UNED post tuta lernojaro. La ekzamenoj okazos de majo ĝis junio. La aliĝo al libera ekzameno kostas 80 eŭrojn kaj ne postulas hispanan civitanecon aŭ studentecon en alia ajn programo de UNED.

## PLANOJ POR APRILO

Ni anoncos tion denove en venonta numero, sed por ke vi faru viajn planojn, ni jam antaŭ-anoncas du tradiciajn aktivadojn en venonta monato aprilo:

Kadre de "La Noche de los libros", organizita de la madrida regiono, vendrede la 25an de aprilo je la 18,00 vespere ĉe la sidejo de HEF/MEL, okazos prezentado de nova libro, kun titolo: "Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia" en dulingva eldono hispana/esperanta, fare de ĝia aŭtoro, Ana Manero.

Ni ankaŭ partoprenos en la tradicia legado de Don Quijote en la Círculo de Bellas Artes. Du el ni legos pecon de la verko en Esperanto, je la komenco de la aktivado, la 23an je la 20,00 horo. Volontuloj por tiu legado kontaktu kun la Liceo, ĉe madrid@esperanto.es. Kiel kutime, ni prioritatigos homojn kiuj ĝis nun neniam partoprenis tiun ĉi tre interesan eventon.

## MADRIDAJ RENKONTOJ

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn. La 3-an de marto vizitos la sidejon Viviana kaj ŝia patrino, el Italio, ambaŭ esperantistoj.

La unuasabata kunveno okazis la 1-an de marto, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia).

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: https://x.com/LiceoMadrida (sed notu la decidojn komentitajn en la unua ĉapitro). Kaj memoru ke MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com